

Laŭokaza Novaĵletero.

Organo de la

Internacia
Komerca kaj Ekonomia
Fakgrupo.

P.O. Kesto 25041,
3001HA Rotterdam,
Nederlando.

Numero 7;

IKEF
★
1984

aŭgusto, 1985.

Metiistoj en Brianza, Italio.

Teksaĵo aŭ teksarto en la vilaĝo Vedano,

de Marco Picasso.

Ekparoli pri la metiista produktado de S-ro Pirovano en la malgranda vilaĝo, Vedano al Lambra, (malpli ol 7 000 loĝantoj, en apud-eco de la fama Monza aŭtovetkurejo), bezonas anekdoton, ĉar lia historio komenciĝis dum la Sankta Jaro, 1950. En tiu jaro, S-ro P. estis juna vilaĝa knabo, lernoservisto ĉe ege malgranda teksejo, kiam la teksejestro aŭdis pri mendo, kiun la Vatikana Ŝtato volis fari, rilate provizo de tablotukoj kaj buŝtukoj por la kardinalaro kaj episkoparo, kiuj estos venantaj al Romo dum tiama Jubilea Jaro.

Inter multaj aliaj partoprenontoj, la teksejestro, S-ro Rapetti, volis pretigi iun teksartaĵon kaj veturi al Romo por konkuri per la produkto al tiu grava provizo.

S-ro Pirovano ankoraŭ rakontas, kiel ili laboris pretigante la artajn tablotukojn: al tute blankega brodaĵa katuno centre oni brodadis la vaticanan blazonon; flanke aliajn religiajn subjektojn, kaj sube la jaron kaj la latinan skribaĵon, "Annus Sanctus".

La tukoj tre plaĉis al gelaboristoj, amikoj kaj vilaĝanoj; sed pleje valoris la juĝon de la preĝejestro, vera aŭtoritatulo inter la tiamaj 2 500 loĝantoj de Vedano. Kaj tiu konsideris la tukojn mirindajn kaj tute taŭgajn por la religie grava okazo.

Iom orgojle, kaskore esperante, la teksejestro entrajnigis kaj veturis al Romo, kie li baldaŭ troviĝis inter famaj teksejestroj antaŭ la monaĥina ekzamena komitato.

La ekzameno de la tukoj daŭris plurajn tagojn, kaj, post la longa diskutado inter la monaĥinoj en la fermita ĉambro, kie ĉiuj tukoj estis ekzamenataj, la ĉefmonaĥino alvokis individue la produktistojn, kaj en sinsekvo venis la momento de S-ro Rapetti.

Li eniris, kaj unuafoje vidis la belajn tukojn sinvidigantajn sur benkoj; tuj li komprenis. Ĝuste kiel malfacile estis tiu tasko de la monaĥinoj.

La ĉefmonaĥino nenion demandis lin pri lia tuko; ŝi lin petis rigardi ĉiujn la tukojn kaj ekĉirisan opinion pri la aliaj. Franke li devis respondi, ke malfacile li povus elekti la plej belan kaj taŭgan. Pri iu el ĉiuj li eltrovis ian taŭgan karakteraĵon; tiu ĉi estas tre bela, tiu estas zorge teksita; ankaŭ tiu havas mirindan brodaĵon; eble ĉi tiu estas iomete malpli delikata, ...

"Kaj kion pri la via?" demandis la monaĥino.

"Nu! franke mi estas kontenta pri mia tuko, ĉar mi tre bone konas kiom da zorgo mi kaj miaj helpantoj enmetis en la teksaĵon. ..."

"Bone! via tuko estas preferenda."

(daŭrigo je paĝo ok)

La Fondkunveno,
Sub la prezido de S-ro Franz J. Braun, en
Augsburgo, je la 6-a de aŭgusto, 1985.

Jam iom antaŭ la anoncita horo por la Fondkunveno, la Prezidanto, akompanata de la Ĝenerala Sekretario, havis la plezuron renkontiĝi por la unua fojo kun du Membroj de IKEF: S-ro F.-X. Gilbert kaj D-ro G. Polerani.

Kiam akurate la pli ol tridek partoprenantoj kunsidis, troviĝis inter ili Akademiano W. Bormann; Prezidanto de UEA G. Maertens; Antaŭa Membro de UEA E.J. Woessink, Ĝenerala Kunkompilinto de IKEF B. Vogelmann.

La Prezidanto bonvenigis la ĉeestantaron, kaj laŭtleĝis mesaĝojn de subteno el Ĉinio, (la Ŝanksia Industri-Komerca Federacio), kaj el Hungario, (D-ro I. Gether kaj kunlaborantoj). La Ĝenerala Sekretario prezentis pardonpetojn pro ne-ebleco ĉeesti, flanke de S-rino Luin kaj S-roj Mboge Mbele, Aroĉa, Lee, Picasso, Rapley, Rotsaert kaj Wiersch, ĉiuj Membroj de IKEF.

Fakgrupo jam havas du kunlaborantojn, sed pliaj estas serĉataj; pro manko de kunordiganto, la laboro ankoraŭ ne efektive komenciĝis, sed la klara sinteno de la komentantoj estas, ke tiu laboro estas nepre por niaj ceteraj taskoj.

Oni rimarkigis, pri la propono verki ekonomi-komercan rubrikon, ke revuo Budapeŝta Informilo jam havas tian rubrikon kaj volas kunlabori kun ni.

Pluraj proponoj pri la kampanjo por komercaj reklamanoncoj estas notitaj por posta diskuto, inter ili la ideo, ke IKEF agu kiel agentejo por reklamanoncoj ĝenerale.

La propono aranĝi aŭ peradi negocojn, pere de la i.l., vokis plurajn subtenajn komentojn, inter ili tio, ke IKEF instigu pli vastan uzadon de ekzistantaj turistaj eblecoj, ekzemple tiuj de ESPERANTOTUR en Pollando, kaj peradi partoprenojn en specimenofoiroj sub taŭgaj aranĝoj.



oligis en Augsburg: < S-ro L. Mee; > S-ro F. J. Braun.

La Prezidanto prezentis la agadprogramon, jam publikigitan, kaj invitis diskuton. Punkto post punkto, la programo trovis senhezitan akcepton, foje kun trafaj komentoj por posta diskuto.

Pri la terminologia laboro, la

Evidentiĝis granda subteno por la propono ebligati renkontiĝojn kaj studseminariojn, kaj oni atentigis pri la aparte favoraj eblecoj por tiaj aranĝoj en certaj landoj. Estigis ĝenerala subteno por la ideo, ke la Fakgrupo zorgu pri la ĝeneralaj aranĝoj, kaj komisiu al individuaj membroj la taskojn prepari referaĵojn kaj reprezenti la Fakgrupon kiel eble plej ofte en ĉiaspecaj tiaj aranĝoj; la Novajletero de la Fakgrupo publikigu ĉiujn eblajn detalojn, inkluzive de bezonataj adresoj.

La Prezidanto vortumis la resumon, ke ja estas bezono por internacia faka asocio en la koncernaj kampoj. La kunveno adoptis la konstaton, kun aplaŭdo.

La Ĝenerala Sekretario prezentis la proponitan Statuton, atentigante, ke ĉiu ĉeestanto havas ekz-

empleron kiel parton de la Tagordo-folio. Tuj estigis ĝenerala interkonsento, ke ne necesus laŭtlezi la tutan tekston. S-ro Mee transdonis proponojn por ŝanĝoj en tiu teksto, proponitaj de D-ro Picasso kaj S-rino Luin, Membroj de IKEF.

D-ro Picasso volas doni apartan atenton al plibonigo de komercaj rilatoj inter la 'tria mondo' kaj la evoluintaj landoj, kaj al merkatesploraj rezultoj. Kun S-rino Luin, li volas iom pliprecizigi la vortumadon pri organizaĵo-membroj, kaj S-rino Luin aparte volas certigi, ke elekto al la Estraro nur dividuaj ordinaraj membroj.

Krome, S-rino Luin volas pliprecizigi la kondiĉojn, sub kiuj la Jarraporto de la Estraro ricevu aprobon, kaj ke la Statuto enhavu priskribon de minimuma averto de la okazigo de ĝenerala kunveno. Plie, ke en okazo de dissolvo de la Fakgrupo, iuj restantaj havaĵoj nepre iru por eluzo al asocio, kiu havas celojn kongruajn kun tiuj de la Fakgrupo.

S-ro Mee laŭtlegis la amendojn proponitajn al la publikigita teksto por konformigi la tuton al la bezonoj, kaj invitis komentojn.

Pluraj voĉoj atentigis, ke bezonata krom la Statuto estas Ĝenerala Regularo, en kiu staru klare la kondiĉoj sub kiuj voĉdonadoj validiĝas; la metodo laŭ kiu amendoj al la Statuto estu faritaj; la Ĝeneralaj labormetodoj sekvotaj de la Estraro; la labormetodo pri revizorado de la kontotenado, kaj tiel plu. Post diskuto, estis evidenta interkonsento, ke tia Ĝenerala Regularo estu kunmetita kiel eble plej maldaŭ, kaj publikigita al la membraro por akcepto per perpoŝta voĉdonado. Promeso tion fari estis donita de S-ro Mee, kaj la kunveno akceptis tion.

La Prezidanto anoncis la intencion formale proponi adopton de la Statuto, kaj elekti Estraranojn, post paŭzo kiu donus eblecon al ĉeestantoj formale aliĝi al la Fakgrupo, laŭvole.

Re-vokante la ĉeestantojn, post la paŭzo, la Prezidanto invitis voĉon proponi adopton de la Statuto. D-ro G. Polerani tiel proponis, kaj D-ro Bormann kun pluraj aliaj voĉoj subtenis la proponon,

por la publikigita teksto plus la amendoj laŭtlegitaj dum la pli frua parto de la kunsido. La Prezidanto petis mansignon de tiuj membroj de la Fakgrupo, kiuj volas adopti la Statuton. Dek unu membroj tiel voĉdonis por la Statuto; neniu volis voĉdoni kontraŭ, sed du membroj volis esti sindetenoj. Kalkulante ankaŭ pri la ok kromaj voĉoj de la pardonpetintoj, la Prezidanto deklaris, ke la Statuto estas adoptita unuanime; la kunveno respondis kun aplaŭdo.

Tuj je anonco, ke la sekvanta tasko estas elekti membrojn de la Estraro, evidentigis, ke pluraj membroj volis, ke S-ro Braun estu tiel formale elektita, sed por dece ebligis tion necesus, ke li portempe ĉesu esti prezidanto de la kunveno. S-ro H. Welling prenis la seĝon, kaj petis proponojn. Laŭ komisiono de D-ro Picasso, S-ro Mee proponis la nomon de S-ro Braun por esti Prezidanto; D-ro Bormann tuj subtenis la proponon. Ne estis alia propono por la ofico, kaj la propono estis adoptita per akklamado, kun naŭ voĉoj por kaj neniu kontraŭa voĉo.

S-ro Braun proponis la nomon de S-ro Mee por esti Ĝenerala Sekretario; S-ro Gilbert tuj subtenis la proponon. Voĉdono donis sep voĉoj por kaj neniu kontraŭ, kaj S-ro Welling deklaris la elekton farita.

Por la eblaj kvin postenoj por Estraranoj, D-ro Bormann proponis la nomon de D-ro Picasso; D-ro Polerani proponis la nomon de S-ro Gilbert, kaj tiu lastnomito proponis la nomon de D-ro Gether. Ĉiuj proponoj ricevis aklamatan subtenon. Neniu alia nomo estis proponita, kaj S-ro Welling deklaris la elektojn faritaj.

S-ro Braun reprenis la Prezidantan seĝon, kaj esprimis dankojn pro la subteno donita al li persone, kaj por la preteco de la novaj Estraranoj akcepti la taskarojn. Li promesis, ke la multaj opini-esprimoj kaj proponoj faritaj dum la diskuto ricevos atenton flanke de la Estraro, kaj esprimis dankojn al ĉiuj partoprenantoj.

La kunsido fermiĝis je la 16.15a horo.

STATUTO de la

Internacia Komerca kaj Ekonomia Fakgrupo.

Formate adoptita fare de la membroj de la Fakgrupo dum ĝenerala kunsido, tiukaŭze kunvokitaj, je 1985-08-06, en Aŭgsburgo, Okc.-Germanio.

1. Tiu ĉi Statuto aludas al unuiĝo kun la titolo, Internacia Komerca kaj Ekonomia Fakgrupo, por kiu taŭga mallongigo estas IKEF, aŭ en la nuna teksto: la Fakgrupo.

2. La Fakgrupo konsistas el Esperantistaj organizaĵoj kaj individuaj personoj. La sidejo de la Fakgrupo estas Amsterdamo, sed translokiĝo de la sidejo eblas, se necese pro ŝanĝo en la cirkonstancoj de la Fakgrupo.

3. La Fakgrupo havas la ĝeneralan celon disvastigi la uzadon de la internacia lingvo, Esperanto, kaj plifaciligi ĉiuspecajn rilatojn inter la homoj en la kampoj de komerco, ekonomio kaj ekonomia scienco, indiferente pri la nacieco, ŝtataneco, raso, religio, politika sinteno kaj gepatra lingvo de la individuaj homoj.

4.1 La Fakgrupo provas atingi tiun ĉi celon per jenaj agadoj:

4.1.1 apogado ĝenerale al ekzistantaj Esperantistaj organizaĵoj, kun aparte favora apogado al tiuj organizaĵoj kiuj aŭ instruas la lingvon aŭ provas ebligi pli altnivelan konon de la lingvo per fakaj vortaroj kaj studlibroj;

4.1.2 agadoj por ebligi la eldonadon de faka terminaro por la kampoj de komerco kaj ekonomio, kaj la daŭran laboron ĝisdatigi tian terminaron;

4.1.3 agadoj por ebligi renkontiĝojn de Membroj de la Fakgrupo, kaj por starigi studseminariojn je kiuj estu prezentataj referaĵoj pri esploroj faritaj en la apartaj kampoj de komercaj rilatoj, ekonomio kaj merkatesploraj rezultoj;

4.1.4 subtenado de Membroj agantaj por aranĝi negocojn inter si aŭ inter ĉiuspecaj organizaĵoj, uzante la internacian lingvon, Esperanto;

4.1.5 eldonado de faka bulteno aŭ de alia formo de revuo, kaj/aŭ subtenado de aliaj revuoj, precipe per varbado de reklamanoncoj, (ekzemple de entreprenoj), en la internacia lingvo, Esperanto, kaj verkado de fakaj artikoloj;

4.1.6 laŭebla subtenado de ĉiuj agadoj de Esperantistoj pliakrigi

konscion de la valoro de Esperanto en la apartaj kampoj de intereso, kaj aparte por plibonigado de komercaj rilatoj inter la tiel-nomata 'tria mondo' kaj la evoluantaj landoj, kaj

4.1.7 aplikado de aliaj jure permesitaj rimedoj, kiuj alproksimigas la celon de la Fakgrupo.

4.2 Por la plenumo de sia celo, la Fakgrupo rajtas akcepti aŭ akiri propraĵojn, akumuli kapitalon, fari investojn, ricevi rentojn kaj dividendojn el investoj faritaj, kaj dungu oficistojn.

5. La oficiala lingvo de la Fakgrupo estas la Zamenhofa lingvo, Esperanto, tia kia ĝi estas difinita per la Fundamento de Esperanto kaj oficialigita per la Akademio de Esperanto.

6.1 Ordinara Membro de la Fakgrupo povas esti:

(a) Ĉiu individua persono kiu subtenas la celon kaj pretas akcepti ĉiujn devojn preskribitajn en tiu ĉi Statuto, kaj

(b) iu organizaĵo, kiu uzas aŭ pretas uzi la internacian lingvon, Esperanto, por komercaj rilatoj aŭ ekonomiaj interŝanĝoj, aŭ pretas apogi tian uzadon.

Principe, Ĉiu Membro havas la rajton je unu voĉo en iu voĉdonado, ĉu pri ŝanĝo en tiu ĉi Statuto, ĉu pri iu alia decido, kiu leviĝas el aplikado de tiu ĉi Statuto.

Membreco aŭtomate implicas la devon finance kontribui al la mastrumado de Fakgrupo.

Organizaĵo-Membro anoncas al la Ĝenerala Sekretario la nomon de individua persono, ne necese Ordinara Membro de la Fakgrupo, kiu ĝuas la fidon de tiu organizaĵo kaj rajtas reprezenti ĝin al la Fakgrupo.

6.2 Honora Membro de la Fakgrupo povas esti tiuj individuaj personoj kiuj, pro rekonataj meritoj por la Fakgrupo, estas invitataj akcepti honoran membrecon sekve de unuanima decido de la ceteraj membroj dum ĝenerala kunveno aŭ per poŝta voĉdonado.

Honora Membreco ne implicas la devon fari regulajn kontribuojn al la kaso de la Fakgrupo.

- - Statuto de IKEF - paĝo du - -

7.1 La gvidado de la Fakgrupo estas konfidata al Estraro, elektita de la Ordinaraĵ kaj Honoraj Membroj de la Fakgrupo el inter la individuaj Ordinaraĵ Membroj. Estrarano tenas sian oficon por du jaroj ekde elekto, sed rajtas prezentiĝi por re-elekto.

7.2 La Estraro konsistas el Prezidanto, Ĝenerala Sekretario kaj du ĝis kvin aliaj Estraranoj, inkluzive de Vicprezidanto kaj Financa Konsilanto.

7.2.1 La Prezidanto reprezentas la Fakgrupon, kaj subskribas kun la Ĝenerala Sekretario la ĉefajn dokumentojn. Prezidanto prezidas en la Estraro kaj ĝeneralaj kunvenoj, sed rajtas portempe transdoni tiun prezidan rolon al la Vicprezidanto aŭ al portempa prezidanto, se necese.

7.2.2 La Ĝenerala Sekretario:
 (a) zorgas pri la efektivigo de la decidoj de la Estraro;
 (b) proponas al la Estraro iniciatojn por decido, kaj
 (c) ĝenerale prizorgas la eksterajn rilatojn de la Fakgrupo.

7.3 La kason de la Fakgrupo prizorgas la Financa Konsilanto, (aŭ la Ĝenerala Sekretario en anstataŭo), kiu krome regule raportas al la Estraro pri la evoluo de la fakgrupaj financoj.

7.4 La Estraro kunmetas ĉiujare raporton pri la agado de la Fakgrupo, inkluzive de raporto de revizoroj aprobante la kontotenadon, kaj tiun kombinitan raporton publikigas en la daŭro de maksimume kvar monatoj post la fino de la kalendara jaro al kiu ĝi rilatas. Principe, plena okazo diskuto estu donata dum ĝenerala kunveno de la membraro, cele al aprobo de la raporto, sed en jaro dum kiu ĝenerala kunveno ne okazas, aprobo de la raporto sekvas aŭtomate du monatojn post publikigo, krom se pli ol duono de la membroj skribe al la Ĝenerala Sekretario indikas malaprobos. Alikaze, anonco de ĝenerala kunveno okazas samtempe kun publikigo de la raporto, kun minimuma averto de du monatoj.

8. Ĝeneralaj kunvenoj de la membroj okazu principe unufoje dum la jaro, prefere en la kadro de Universala Kongreso aŭ dum simila manifestacio de la Esperantista publiko. La ĝeneralaj kunvenoj estas okazoj ne nur por doni aprobon al la jarraporto kaj elekti la Estraron,

sed ankaŭ por aŭdigi kaj diskutigi referaĵojn pri fakaj esploroj faritaj de membroj.

Elekto de membroj de la Estraro okazas per skriba voĉdonado perpoŝta, se ne eblas en la koncerna jaro okazigi ĝeneralan kunvenon.

9. En okazo de neceso dissolvi la Fakgrupon, la Estraro per simpla plimulto da voĉoj, aŭ la laste restante funkcianta Estrarano, nomaskomisionon kiu likvidas la kurantajn aferojn kaj transdonas iujn restantajn havaĵojn al Universala Esperanto-Asocio, kun la celo utiligi tiujn havaĵojn por similaj celoj.

Rotterdam,
1985-08-17.

//

Ĝenerala Regularo de IKEF.

Noto de la Ĝenerala Sekretario.

Kiel jam aliloke raportita: dum la Ĝenerala Kunveno de Membroj de la Fakgrupo en Aŭsburgo, oni plene akceptis la proponitan Statuton kaj kelkajn amendojn al la proponita teksto.

Samtempe, oni atentigis, ke kelkaj mankoj evidentigas en tiu Statuto, mankoj kiuj povus esti plenigitaj per kunmeto de regularo verkota por fiksi precize tiajn aferojn.

Cititaj kiel mankoj estas: la kondiĉoj sub kiuj voĉdonadoj akiras validecon;
 la metodo laŭ kiu amendoj al la Statuto estu faritaj;
 la labormetodoj sekvotaj de la Estraro, kaj la labormetodo sekvota por certigi taŭgan revizoradon de la kontotenado.

Kunmeti tia Ĝenerala Regularo estas tasko akceptita de la Estraro; post la necesaj interŝanĝoj de ideoj kaj opinioj, la Estraro publikigos taŭgan tekston, kaj ĝin proponos al la membraro por perpoŝta voĉdonado por akcepto.

Intertempe, la sinteno de la Ĝenerala Kunveno klare estis, ke la Fakgrupo sekvu en la koncernaj cirkonstancoj agadmanieron similan al tio jam akceptitan de pluraj aliaj fakaj asocioj de Esperantistoj.

En tiu spirito, ni publikigas nun la Statuton, kaj sindevigas nin agi konforme al la esprimita sinteno de tiu unua Ĝenerala Kunveno de la Membroj de IKEF.

Lawrence Mee,
Ĝenerala Sekretario.

Me nure sed jes ĉefe pro la Fondkunveno en Aŭgsburgo nia membro-listo agrable pufiĝis lastatempe; ĉi-foje ni bonvenigas dek novajn membrojn, kaj aldonas unu landon al la ceteraj dek kvin landoj, en kiuj troviĝas membroj niaj.

Membro-listo je 1985 - 08 - 15.

23. Picasso, D-ro K., merkatesploristo;
via D. Gasperi 7, I-20057 Vedano al Lambro, Italio;
24. Ekonomikista Grupo de H.E.-A., faka asocio;
p/a Berényi u. 816, H-1016 Budapest, Hungario;
25. Blazquez, Ing. F.G., inĝeniero; eksporto-importo-konsilisto;
Ap. 75090, Caracas 1070-A, Venezuelo;
26. Bühl, S-ro H.H., asistanto en bilanco-revizorasocio;
H.-Baumann Strasse 40, D-7000 Stuttgart, Okc. Germanio;
27. Bormann, D-ro W., ministeria oficisto-ekonomiisto;
Schärstrasse 26, D-2050 Hamburg 80, Okc. Germanio;
28. Baber, S-ro R.L., entreprena konsilisto; programaringeniero;
L. Gustav Ring 5, D-6380 Bad Homburg, Okc. Germanio;
29. Maertens, S-ro G., ŝtatoficisto-direktoro;
Pr. Leopoldstraat 51, B-8310 Brugge, Belgio;
30. Welling, S-ro H., entreprenestro: entrepreno STABO;
Bahnhofstrasse 22, D-3201 Hoheneggelsen, Okc. Germanio;
31. Argentino, S-ro S., komercisto pri legomoj;
Mercato Ortofrutticolo, I-37135 Verona, Italio;
32. Novaković, S-ro D., entreprenestro: entrepreno ONDO;
179 Principal, Delson, Que. JOI 1G0, Kanado.

Kiel kutime, ni petas averton pri iu eraro en publikigitaj detaloj.

Al tiuj membroj, kiuj aliĝis dum la Kongreso en Aŭgsburgo, ni proponis favoran, (ne-ripetotan!), aliĝkotizon; ili pagis tridek markojn en kontanto kaj ĉuos membrecon sen plua pago ĝis la fino de 1986, la proksima jaro. Tiuj membroj ne aŭtomate ricevos Novajleterojn, (LN), jam aperintajn dum la unua duono de 1985, sed ricevos ilin kontraŭ peto en okazo de bezono. Memorante, ke preskaŭ triono de la paĝoj en tiuj tri LN-oj temas pri la aranĝoj por la Fondkunveno, oni tamen eble havus intereson en la ceteraj artikoloj:

- LN 4: Malkovrinda lando, Kameruno; Nia peradservo;
- LN 5: La utilo de reklamanoncoj por E.; Intersanĝo de ideoj;
- LN 6: Pensoj de pseŭdoredaktoro; La problemo de senlaboreco en Okcidenta Eŭropo.

Ĉar por disponigi ekzemplerojn de tiuj LN-oj necesus fari novajn fotokopiojn, ni petas, ke mendoj estu farataj nur en okazo de bezono aŭ intenco utiligi la informojn.

La kostoj starigi la Fondkunvenon en Aŭgsburgo.

Ni esprimas dankojn al ĉiuj, kiuj kontribuis al okazigo de la Fondkunveno. La unuaj dankoj iras al la Kongresa Komitato en Aŭgsburgo, kiu disponigis al ni senpage la kunvensalono, tute taŭgan.

Apartaj dankoj ŝuldiĝas al tiuj Membroj niaj kiuj, aŭ per mondonacoj faritaj aŭ pro promesoj fari donacon, ebligis la ĉeeston por unu-taga vizito far la Ĝenerala Sekretario, kiam lastmomente la kostoj fari tian viziton montriĝis timige altaj. Tre valoraj donacoj venis jam de: S-ro J.C. Rapley; S-ro Lee Teck Shiu; S-ro F. Schneider; S-ro F.-X. Gilbert, kaj Indk. Eld. Esperantista. Apartajn dankojn!

Pri informmaterialo.

Niaj preparoj por la Fondkunveno entenis iniciaton, kiu eble havas intereson por Membroj kiuj ne povis tie ĉeesti: ni finpreparis varbfolion, kun la titolo, Invito al kunlaboro kun IKEF.

Tiu ĉi modesta flugfolio enhavas skizon de la (ankoraŭ mallonga!) historio de nia Fakgrupo, kune kun ampleksan priskribon de la originalaj, kaj ankoraŭ validaj, ideoj malantaŭ la iniciato proponi interacian unuiĝon por komercaj kaj ekonomiaj interŝanĝoj mondskalaj.

Sekvas tie mallonga skizo pri la ĝisnuna evoluo de la Laŭokazaj Novaĵleteroj, kaj aludoj al la kontaktoj faritaj kaj farotaj.

Ni provis priskribi kelkajn avantaĝojn de membreco por tiuj individuaj personoj kaj Esperantistaj organizaĵoj, kiuj havas rektajn rilatojn kun komerco kaj/aŭ ekonomiko, kaj vortumis la eblecojn en la kampo de kolektado de statistikaj donitaĵoj, kaj tiel plu, de pligrandiganta membraro en pluraj landoj. Klaraj alvokoj estas adresitaj al ĉiuj legantoj aliĝi al la Fakgrupo.

Cetere, eperas klaraj informoj pri la sidejo de la Fakgrupo, kaj konciza priskribo de la eroj de la Statuto.

Sur aparta folio troviĝas konsiloj pri la sumo de la jarkotizo, kaj pri la eblaj metodoj fari la pagon al la kaso de la Fakgrupo. Duono de tiu folio estas desegnita por esti aliĝformularo, kun spacoj por personaj detaloj, subskribo, kaj tiel plu.

Ni pensas, ke pluraj Membroj havos la ideon fari prelegon al la loka E.-grupo, dum la proksima 'varbsezono', cele al varbado de novaj anoj. Por tia celo, la enhavo de la 'Invito ...' eble donus valorajn informojn por la prelego. Aliaj informoj estas haveblaj, kune kun modesta kvanto de la informmaterialo, kontraŭ simpla peto al ni. Se vi povas iom kontribui al la kostoj, per, ekzemple, enmeto de respondkupono aŭ monbileto, des pli bone!

Nia kunlaboro kun revuo MONATO.

Abonantoj de la revuo sendube rimarkis la tutpaĝan reklamanoncon sur la dorsa kovrilpaĝo de la julia, 1985-a, kajero de MONATO.

La varbinto de tiu anonco estas nia Prezidanto, kaj laŭ propra ordono, la kurtaĝo propra al la varbinto venos al la kaso de IKEF. Simile okazis pli frue en la jaro pri pli frua anonco. Simile okazos pri tria reklamanonco jam varbita.

Entute, tio estas tre valora kaj imitinda iniciato, pri kiu nia Prezidanto jam atentigis nin pli frue en la jaro. Ĉu ankaŭ vi okupiĝas pri tiu aparta speco de varbagado?

En la sama kajero de MONATO, troviĝas artikolo pri meblofoiro, el la plumo de S-ro P. Seesink, en Nederlando. Dum la kunmeto de la artikolo, S-ro Seesink petis kaj ricevis lingvouzan helpon de IKEF. Tia helpo disponiĝas ankaŭ al ĉiuj niaj membroj.

Ni ne povas tro emfazi la gravecon de aperigo de fakaj artikoloj, pri iu branĉo de komerco aŭ ekonomio, flanke de niaj membroj.

Permesu, ni konsilas, ke tiu ekzemplo de faka artikolo donu instigon ankaŭ al vi verki ion el via propra sperto, kaj ne permesu, ke timo pri lingvouzado estu bremsa faktoro. Helpo estas tiel apude al vi kiel estas la loka poŝtkolekta kesto!

Kaj ne forgesu nian aforismon:

al la mondo pli valoras niaj atingoj ol niaj aspiroj !

Ankaŭ por nia modesta LN-o ni serĉas fakajn artikolojn! La limdato por la proksima kajero estas la 15-a de oktobro, en Roterdamo.

Respondeca redaktoro kaj eldonanto de la Laŭokaza Novaĵletero estas S-ro L. Mee.

ĝo ok

daŭrigo el paĝo unu)

"Kial do?" diris nia amiko, "ĝi
tas ne pli bela ol aliaj."

"Fakte, tio estas vera, sed nur
rekonis la valoron de la aliaj;
aj konkurantoj nur bone parolis
i la siaj, kaj tute ne konsider-
la aliajn; vi estas tiel bona
ksestro kiel honesta kaj humila;
o tio vi venkas."

Ne certe kredante al siaj oreloj
a teksejestro el Vedano eliris
ĉambron, tra la ridetaj demandoj
la famaj teksistoj kiuj certe
s en li nur senzorgan vilaĝan-
Sed kiel venkanto li reiris
jmen, kaj de tiam daŭris zorge
produkti siajn teksaĵojn.

Jam pasis 35 jaroj! La juna
alpanto estas nun la mastro de la
eksejo, kie li produktas tukojn
or hoteloj, restoracioj, malsanul-
joj kaj kafeoj, ĉiam kun la sama
orgo de sia majstro; ankoraŭ li
rovizadas tukojn al religiaj soc-
etoj kaj institucioj, kiujn la
amaj monaĥinoj hodiaŭ direktas.

Mi vidis, antaŭ malmultaj tagoj,
ildon de unu el liaj tablotukoj,
n populara itala semajna revuo,
un la titolo, "estas en modo en
ia Veneto". Ĉu la tuko? Ne, la
rtikoleto temis pri la poentoj-
dieto, en modo ĉe la multekostaj
restoracioj en Romo, (kiel, ekzem-
le, la fama "Harri's Bar"), kies
tablotukojn produktas 'nia' S-ro
Pirovano en Vedano; bildita estas
rozantikva-farbe ĉelikataj tukoj
sankolora brodaĵo reprezentante
rojn kaj foliojn.

Sed liaj tukoj ne nur kovras
tablojn kie famaj aktoroj dietman-
gas, sed ankaŭ modestajn vilaĝajn
gastejojn, feriajn vilaĝajn rest-
oraciojn kaj hotelojn, laŭlonge

Italion ĝis Sicilio.

Kiel sin lokumas la teksaktiv-
ado de S-ro Pirovano, en sia lando?

En ĉi tiu regiono, nomita Bri-
anza, (pr.: brianca), troviĝante
inter Milano kaj, norde, la Antaŭ-
alpoj, teksindustrio estas inter la
tradiciaj metiartoj kaj industrioj,
(inkluzive de koton- kaj lin-spin-
ejoj kaj teksejoj, tinkturejoj kaj
tekspresejoj). Precipe traktas
pri malgrandaj entreprenoj, preskaŭ
cent el ili, kiuj dungas entute pli
ol ok mil laboristojn; krome, al-
iaj 50 metiistaj entreprenoj, kiel
tiu de Pirovano, produktas multe-
nombrajn varojn.

Povas ankaŭ interesi, ke tiu in-
dustrio dungas po 40 spertaj kaj
po 60 simplaj laboristoj el ĉiu
cent, kaj plejparte virinoj. In-
ter la spertuloj, laŭ graveco kaj
malfacileco de la laboro, ni povas
listigi: la desegnoligistoj, kiuj
pretigas la ĵakardmaŝinojn; la
teksistoj kaj la farbistoj, la
varpistoj, la kardistoj, la komb-
istoj kaj la retordistoj.

La teksindustrio en Brianza,
kiel aliloke, depresiĝis dum la
lastaj jaroj, pro la konkurenco de
amasproduktaĵoj el Suda-Koreio,
Ĉinio, (Tajvano), kaj aliaj landoj,
kaj dum kvin aŭ ses jaroj, multaj
entreprenoj devis maldungi multnom-
brajn laboristojn.

Sed rezulte de la depresio, eĉ
pliboniĝis la kvalito de la varoj.
Hodiaŭ, multaj bone laboras kaj
eksportas; ilia forta flanko estas
la specialeco de la desegnoj, la
kvalito de la teksaĵo kaj tinktur-
aĵo, kaj finfine ilia konata eleg-
anteco.

P e r s o n e .

Inter la pluraĵaj interesoj ten-
ataj de via Ĝenerala Sekretario,
estas tio de daŭra kontrolo de
vivniveloj en diversaj landoj sur-
baze de teoriaj unuoj de aĉetpovo
de la enlanda valuto.

La metodo baziĝas sur kolektado
de la prezindicoj por konsumaĵoj;
la rezulto, post komputado, estas
serio de 'kurzoj' por konstantval-

ora unuo de aĉetpovo.

La celo estas proponi la rezult-
ojn por uzado flanke de entrepren-
istoj, sindikatoj, bankoj kaj reg-
istaroj, por, finfine, konkuri la
plagon de inflacio en taŭgaj kazoj.
Kunlaborantoj estas serĉataj.

Se la ideo kaptas vian interes-
on, bonvolu anonci tion al mi. Mi
sindevigas min respondi ĉiujn let-
erojn.
Lorenc' Mi.

Interŝanĝo de ideoj.

Por nia Biblioteko ni ricevis, de S-ro P. Wimmer, en Varsovio, ekzemplerojn de *Kajero 1* ĝis inkluzive 5 de la revuo, *Informilo pri Interlingvistiko*, eldonita tri-foje en la jaro de Akademia Centro Interlingvistika, en Varsovio.

Tiu ĉi relative nova revuo celas plenigi la vakan lokon restantan post malapero de la antaŭa '*Novajletero por Interlingvistikoj*', de la Centro de Esploro kaj Dokumentado de UEA. Ĝi estas "modesta eldonaĵo, ne formale prezentita" ĉefe por "perado de informoj" pri esploroj en la kampoj de interlingvistiko kaj Esperantologio.

La epiteto 'modesta' certe taŭgas, (kvankam nia opinio estas, ke kun nur tre malmulte pli da diligenco pri interpunkciado, vortdividado, paĝaranĝado kaj plinetiĝado dum bindado, la fina rezulto meritus multajn laŭdojn), kaj la enhavataj informoj pri komparaj studoj ne havas multan intereson por tiuj, kiuj okupiĝas pri aliaj kampoj de intereso. La tuto formas valoran fonton de informoj pri, ĉefe, artikoloj aperintaj antaŭnelonge. Se kaj kiam la terminologia laboro de nia Fakgrupo efektive komenciĝos, tiu ĉi kolekto de utilaj informoj havos valoron por la kunordiganto.

De S-ro O. Stolberg, en Leipzig, Orienta-Germanio, ni ricevis por la Biblioteko du verketojn kiuj ŝajne estas tute taŭgaj kiel fontmateriale por ni. Sed, ho, ve! la valoro de ambaŭ estas tiel mizere malalta, ke ili apenaŭ meritas mencion eĉ en nia modesteta revuo.

Temas pri du eldonaĵoj de la Centra Kooperativa Unuiĝo, en Sofia, Bulgario: la 90-jara Jubileo, (1980); Rezolucio de la 9-a Kongreso de la Centra Kooperativa Unuiĝo, (1981). La dua el tiuj verketoj plejeble provizus por ni valoran fonton de terminoj en la aparta kampo de kooperativa mastrumado de entrepreno, sed elsarki ilin el la amasa fiherbaĵo de banalaĵoj kaj tordaj frazoj, malaltkvalite presitaj, estus timiga tasko por iu esploranto!

Al ambaŭ donacantoj ni esprimas

sincerajan dankojn.

Kun la aktiva helpo de nia nova Estrarano, D-ro M. Picasso, en Italio, ni komencas senti firman bazon portio, kiun ni antaŭe nomis la Peradservo de IKEF.

D-ro Picasso pensas, ke ni ĉiuj devas utiligi la Novajleteron por anonci niajn aktivecojn, eble sub aparta rubriko. Krome, ke ni proponu tiun rubrikon al Esperantistaj organizaĵoj, kiuj eĉ ne estas membroj de IKEF sed pretas pagi al ni pro reklamanonco legota de legantoj kiuj havas rektan rilaton kun iu flanko de komerco.

La ideoj bezonas ankoraŭ iom da polurado, sed verŝajne neniam venos pli bonan momenton ol la nuna por surpaperigi kelkajn lastatempajn sciigojn.

De nia tre aktiva membro en Kongkongo, S-ro Lee, direktoro de la entrepreno, "Espero Enterprises", ni ricevis, (kaj en Aŭgsburgo vendis!), specimenojn de tre utila ŝlosilringo enhavanta faldeblan mezurilon kaj surhavanta la emblemon de la centjara jubileo de Esperanto. Kun po-detala vendoprezento de proksimume kvar-kaj-duono guldonoj, ĝi estas agrabla donacaĵo, je agrabla prezo; oni proponas tre favorajn rabatojn por kvantaj mendoj.

S-ro Lee samtempe proponas liveron de elektronika horloĝeto por tablo aŭ poŝo, same kun la jubilea emblemo, kaj same je po-detala vendoprezento tute agrabla, kaj kun tre favoraj rabatoj por kvantaj mendoj.

Por ambaŭ, kaj ankaŭ por aparta tipo de ole-pentraĵoj produktataj en sia lando, S-ro Lee volas establi komercajn rilatojn, ne nur kun Esperantistoj sed ankaŭ pere de E-o kun importistoj. Kurtaĝoj el la negocoj venos al IKEF!

El Togolando ni ricevis, de membro-kandidato, S-ro K. Gbeglo, entuziasmigajn proponojn peradi por niaj membroj turismajn aranĝojn en sia lando, kaj ĝenerale agi por plifortigi interŝanĝon de varoj, utiligante la internacian lingvon.

Ni memorigas, ke ni jam havas similajn proponojn el Kameruno, de S-ro Mboge Mbele, Membro de IKEF; ni esperas aperigi pli detalajn pro-

poncojn pri Togolando.

El la sama regiono de Afriko, el Nigero, venis helpopeto de Esperanto-grupo, kiu apenaŭ havas rilatojn kun komerco sed povas esti tre interesa kontakto por ni pro alia kaŭzo. La grupo aktivas en la Universitato Ekpoma, en la provinco Bendel, en Nigero, kaj ni informpetos pri studentoj de ekonomiko tie. Ni ricevis liston de dudek kvin membroj de la grupo, verŝajne gestudentoj, sed pliaj informoj mankas al ni.

Tiuj lastatempaj informpetoj - kaj helpopetoj - plifirmigas por la konvinkon, ke gravaj ŝancoj utiligi la i.l.-n por fari konkretan helpon al la 'tria mondo' staras antaŭ ni. Nia unua paŝo devas esti ebligita al tiuj Esperantistoj, niaj kontaktoj, membriĝi ĉe ni kaj tiel esti en pli bona kontakto kun la evoluantaj landoj.

Nia Subtena Fondaĵo atendas viajn donacojn !

Sed egale aŭ eĉ pli grave estus provoj malfermi porcojn ebligante pli facilan eksportadon de varoj el tiuj landoj tiel, ke la Esperantistoj tie - kaj poste la enloĝantoj en tuto - povos baldaŭ perlabori sian membrecon kaj kun plia fiero montri la efikon de nia solvo de la lingvo-problemo en nia aparta kampo. Ĉiuj el ni kiuj havas, aŭ povas malfermi, kontaktojn rektajn kun importistoj provu utiligi tiujn kontaktojn!

Dum la kunveno en Aŭgsburgo, du aferoj interesaj leviĝis al nia atento.

Nova membro en Okcidenta-Germanio, S-ro H. Welling, atentigis nin pri la multaj specimenfoiroj daŭre okazantaj en Eŭropo, kaj proponis al ni daŭran aranĝon por niaj membroj anonci sian intencon partopreni en ia tia foiro, ĉu kiel ekspozicianto, kiel kliento aŭ kiel vizitanto. Tio ĉi ne estas intenco malfermi apartan budon por propagandi la lingvon, sed metodo utiligi, senkoste, eblecojn pagatajn de la ekspoziciantaj entreprenoj. Memorante pri la raporto, pasintjare, pri io simila okazinte en Tehrano, ni opinias, ke tiu ĉi

estas valora iniciato, kiu meritas aktivan subtenon.

Komisiite de D-ro Picasso, ni antaŭanoncis la intencon utiligi Esperanton dum la Internacia Foiro pri Fiŝkaptado, okazonta en junio, 1986, en Ancona, Italio. Pli konkretaj detaloj haveblos, verŝajne, en septembro, sed iu membro nia, kiu havas jam ideon pri libertempo proksimjare en agrabla loko sur la adriatika marbordo en Italio, povus aktive pripensi la eblecon preni ĝin en junio kaj samtempe doni valoran subtenon al alia grava iniciato ligita kun Esperanto.

De interesanto-informpetanto en Jugoslavio, ni ricevis desegnaĵon por insigno por la Fakgrupo. Iom pli frue ol tio ni ricevis aliajn proponojn de membro-kandidato en Brazilo. De niaj Membroj ni ne ricevis proponojn! Ĉu la ideo de insigno ne pluĉas?

Hazarde, kaj jam antaŭe, sentante veran bezonon de iu emblemo, simbolo de nia ekzisto, ni elpensis desegnaĵon kiun ni uzas nun, eksperimente!, sur la unua paĝo de tiu ĉi Laŭokaza Novaĵletero. Kion vi opinias pri ĝi?

Kaj ni proponas novan konkurson!

Ĉu la nomo, Laŭokaza Novaĵletero ankoraŭ taŭgas? Ĉu ĝi ankoraŭ taŭgas, se ni sukcesus pligrandigi la revuon kaj iom pliimponigi ĝin?

Lasta ero ĉi-foje estas mencio de ideo, kiu ĝis nun estas tiom nebula, ke ni sentas la bezonon teni kaŝitan la nomon de la urbo, eĉ, el kiu ĝi venis al ni, sed ideo kiu, se realigebla, estus enorma grava por la tuta E.-Movado.

Oni petis nian opinion pri la ideo, aranĝi en universitato lekcion pri ekonomiko, cele al disdonado poste de diplomoj al sukcesintoj en ekzameno, la tuto farita en Esperanto!

Verŝajne, aprobo en principo estas donita jam de la estraro de la universitato, kaj tiu estraro komprenas, ke oni devus unuapaŝe provizi lernadon de Esperanto tiel, ke dum, ekzemple, la dua studjaro la gestudentoj kapablus ne nur legi studlibrojn kaj kompreni lekcionojn, sed verki eseojn kaj referaĵojn,

kaj sperti ekzamenon.

Necesas aldoni, ke la nacia lingvo de la lando en kiu troviĝas tiu universitato estas unu el la malpli fortaj lingvoj de la mondo, lingvo en kiu, preskaŭ tute, mankas studlibroj pri ekonomiko. La proponanto volas, ke estontaj studentoj ne estu devigataj lerni la germanan aŭ anglan lingvon nure por esti ebligita studi la fakon.

Kion vi opinias? Ĉu io simila jam ie okazis aŭ okazadas?

lm

Ĉu tiu ĉi desegnaĵo por insigno meritas vian aprobon?

Ĝin proponis al ni S-ro Tomislav Radisavljević, en la urbo Niš en Jugoslavio, al kiun ni etendas sincerajn dankojn.



Rezervita,

por tiu artikolo,

kiun vi ĝis nun ne verkis!

Estus domage, lasi ne-uzitan tutan paĝon, do jen 'plenigilon'!

Teknike pri la
Laŭokaza Novaĵletero.

Certe troviĝas inter niaj legantoj tiuj, kiuj rimarkas ŝanĝojn en la kunmetado de la LN-oj.

Esperable, via opinio ne estas de la varkvalito malaltiĝis, sed male, ke la teknikaj aspektoj estas sufiĉe plaĉaj nun. Vi verŝajne rekonas, ke la originaloj de la paĝoj estas faritaj je grandeco Din A3, (tio estas, dufoje je grandeco Din A4), kaj per grandecreduktigo ni atingas la grandecojn de Din A5 por ĉiu paĝo.

Tiam, la apartaj folioj estas produktataj per fotokopiado duflanka, poste kunmetitaj kaj falditaj permane, agrafitaj, kaj iom netigitaj, (tiu laste per gilotintipa tranĉilego).

La kostoj de ĉiuj tiaj agoj, (plus tre modesta sumo kiel nomina-

ala laborokosto), estas kolektitaj de Mndk. Eld. Esperantista, kaj fakturitaj al la Fakgrupo, (plus pago de la imposto pro aldonita valoro al la nederlanda ŝtato!).

Evidentiĝas, ke nia originala takso de jarkotizo en la sumo de dudek guldenoj estas ankoraŭ fidinda por kovri ses kajerojn en la jaro, kvankam tre malmulte restas el ĝi; ni certe dependas je viaj krompagoj.

Ĉi-foje, ni eksperimente ŝanĝis la paĝaranĝon por ebligi aldonon de eble kvindek vortoj je ĉiu paĝo.

Al ni la rezulto ne tute plaĉas: la paĝoj estas nun tro dense plenigitaj, ni pensas.

Ni invitas viajn komentojn pri la teknikaj aspektoj de la LN-oj. Komplimentoj estas kompreneble tre aprezataj, sed ni bonvenigos iujn ajn komentojn cele al fidinda plibonigo de la tuto.

Kiel komercistoj, ni devas ĉiam atenti pri la varkvalito de nia 'varo', ĉu ne?

lm

paĝo dek du

REKLAMANONCOJ REKLAMANONCOJ REKLAMANONCOJ

Reklamtarifoj:

a) por Membroj de IKEF:

unu anonceto ĝis inkluzive
ses linioj: senpage;

por pli longaj anoncetoj:
po 1 respondkupono, (irpk),
por ĉiuj ses linioj, inkl.
de la unuaj ses linioj.
Ĉiam unuope mendendaj.

b) por ne-Membroj de IKEF:

po 1 irpk por ĉiu linio, aŭ
por ĉiuj kvin milimetroj de
longeco, enkadrigita,
sed kun minimumo de kvin
irpk-oj.

Ĉiam antaŭpagita.

Por anoncoj je pli granda
larĝeco ol unu kolumno:
laŭ aparta interkonsento.
Ĉiam: tri aperoj de la sama
anonco en sinsekvaj kajeroj
por la prezo de du aperoj.

Kurzo: 1 irpk = 0,90 gld.

La Baza Kurso en Esperanto, de Audrey Childs-Nee. La plej efika metodo instrui kursanaron. Katalogo de UEA, 1984/ paĝo 40.
Mondkomerca Eldonejo Esperantista por ĉiu speco de oficeja bezonaĵo en la internacia lingvo. P.O. Kesto 25041, 3001 HA Rotterdam, Ned. Membro de IKEF.

Pri pagoj al ni.

IKEF ĝis nun ne havas apartan bankrilaton, sed utiligas por ĉiuj financaj traktaĵoj konton en la kontaro de Mondkomerca Eldonejo Esperantista, ĉe la adreso:

P.O. Kesto (Postbus) 25041,
3001 HA Rotterdam, Nederlando.

Ĉiu Eldonejo tenas poŝtĉekkonton, numero 361 47 95, ĉe la nederlanda poŝtĉekinstanco.

Membroj de IKEF pagas jarkotizon je dudek guldenoj, por la kalendara jaro. Ĉe la relativa malaltigo de kostoj kaj laboroj, ni ĉiam konsilas al pago por kelkaj jaroj en antcipio. Anticipa pago por dudek jaroj aŭtomate provizas membrecon kunvivan.

Loĝantoj en landoj sen pagomalfacilaĵoj, kutime povas aĉeti internacian poŝtmandaton ĉe la poŝtoŭficejo, kaj tiel sperti la plej malmultekostan metodon fari transpagon. Adresu tiam internacian poŝtmandaton al la Eldonejo, kun mesaĝo, 'por IKEF'.

Se vi, loĝanto en tia lando, tenas memkonton ĉe la poŝtĉekinstanco en via lando, vi povas fari transpagon tra tiu poŝtĉekinstanco. Informpetu mem ĉe la poŝtoŭficejo!

Foje oni volas fari pagon per uzado de internaciaj respondkuponoj. Tio estas relative multekosta metodo, sed foje la plej efika. La kosto de jarkotizo estas dudek tri internaciaj respondkuponoj.

Se neniu alia ebleco disponiĝas al vi, tiam faru pagon pere de bankĉeko, sed al la persona nomo de S-ro L. Nee, kaj tiam aldonu sep kaj duono da guldenoj por kovri la ne-eviteblajn enkasigokostojn.

Tre multekosta metodo fari pagon de modesta sumo!

Lasta ebleco estas fari pagon tra Universala Esperanto-Asocio, ankaŭ en Rotterdam. Faru mencion de la nomo, Int. Komerca kaj Ekonomia Fakgrupo, kaj UEA aŭtomate elpagos la sumon al ni.